10a JARO 1913. JANUARO 1913.

Unum ovile et unus pastor.
Unu ŝafejo kaj unu paŝtanto.
(JOH., X, 16.)

ESPERO KATOLIKA

INTERNACIA MONATA GAZETO, OFICIALA ORGANO de I. K. U. E.

AL LA LEGANTARO!

Ĉe l'apero de l' unua numero en 1913 „Espero Katolika" alvokas al Vi ĉiuj: Benatan Novjaron!

Ke ĝojo, prospero, feliĉo, same kiel tristeco, sufero, kontraŭaĵoj, — ke ĉio dum la nova jaro al Vi sendota de mano Dia, submetiĝe, dankeme estu akceptata, por ke ĉio, kàj prospero, kàj sufero servu: Ad Majorem Dei Gloriam.

Tia bondeziro igas nin senti, ke ni estas „inter ni", inter katolikoj.

Plenkonfide, senhezite mi do rekomendas „E. K." en Via konata, tiel ofte spertata bonvolemo; por ke pli kaj pli nia revuo dissemu la „bonan semon" en Esperantistaj rondoj, ĉiam pli servu al sia celo.

Sendube ja, Vi miras, karaj legantoj, kial *mi*, *ne* la redaktoro, Vin alparolas en artikolo novjar-gratula?

Laŭ peto de mia kolego-direktoro, mi havas la plezuron sciigi Vin, ke li depost la 1-a de Januaro transloĝiĝis al **Udenhout,** (Nederlando). En tiu urbo li prenis sur sin la oficon de kuracisto-direktoro de katolika kuracejo. Pro la multegaj ŝanĝoj, — la tempomanko kaŭzita de transloĝiĝo, — la nova oficumado, — li komisiis al mi la prizorgon de la Januara-numero. Sed li insistis, ke mi diru Vin, ke baldaŭ li mem denove sin okupos pri la redaktado.

La nova jaro bone komenciĝas.

Nia kara Redaktoro, kiu, pro siaj multaj kuracist-okupadoj, ofte dumnokte devis serĉi tempon por „E. K.", kaj tamen ĉiam (je kiom da energia laboro, Dio nur scias) ĝin trovis, en sia nova ofico havos pli da tempo disponebla. Do: profito por Esperanto, sekve por E. K.

Duoblan gratulon do: kàj al la Redaktoro, kàj al Vi, karaj abonantoj!

Ne decas, ke niaj nelacigeblaj propagandantoj de „E. K." ricevu kiom ajn sinceran, tamen nur *vortan* dankon. Pro tio, laŭpromese, mi publikigas la jenon:

Ĉiu, varbinta al „E. K." por jaro 1913 kvar **tute-novajn** abonantojn, kaj sendinta la 4×2 *Sm* por abonmono, ricevos kiel premion, la belan verkon de nia fame-konata katolika aŭtorino RAMO: „Eĉ en Doloro ni estu ĝojaj."

Same, kiu varbos kvin **novajn** abonantojn ricevos „Kie estas la Eklezio de Kristo", ĉefverkon de Jezuita pastro, tradukitan esperanten de nia eminenta samideanino, fraŭlino M. BORRET.

Kiu varbos sep *novajn* abonantojn ricevos „Katolika preĝaro", bele binditan;

Kiu varbos dek *novajn* abonantojn ricevos la grandan, belstilan, mondkonatan verkon de kardinalo NEWMAN, tradukitan esperanten de RAMO.

Mi notos la nomojn de la varbintoj kaj varbitoj, kaj post plenumo de ĉi-supraj kondiĉoj, forsendos senpage kaj afrankite la premiojn.

Elkore mi esperas, ke tre multajn mi devos forsendi.

Al la hispanaj abonantoj mi bedaŭrinde ĝis nun ne povas havigi definitivajn sciigojn pri riprezentado de „E. K." en ilia patrujo. Malgraŭ mia klopodado, mi ne sukcesis. Provizore mi sciigas, ke abonpago facile povas okazi per alsendo de internaciaj respondkuponoj, haveblaj en ĉiuj poŝtoficejoj de la latina poŝt-unuiĝo. (Kontraŭ unu de Vi sendita respondkupono mi povos, ĉe la poŝtoficejo, ricevi poŝtmarkon da $12^1/_2$ cendoj (Nederlanda monvaloro). Jarabono kostas 2 Spesmilojn, do egalvaloras 20 respondkuponojn).

Tamen mi ne perdis kuraĝon, kaj ĉiam ankoraŭ estas

intertraktanta. En la februaro-numero mi esperas fine doni al Vi kontentigan solvon.

Tute Via en Kristo,
la Administranto
Frans SLEIJFFERS.

Pri la Libro de Jobo.

Oni scias, ke pri Bibliaj studoj ekzistas du katolikaj skoloj: unu ĉiam libereme aliĝas al la novaj progresoj kaj ofte falas en la kondamnitan modernismon; la alia estas pli konservema kaj en siaj studoj ĉiam agas laŭ katolikaj instruoj kaj sekve eraras malofte.

Antaŭ nelonge mi eldonis la suban artikolon en katolika itala ĵurnalo, artikolon, kiu tre plaĉis al la konservemaj kaj malplaĉis al la progresemaj iom modernismaj katolikoj. En ĝi mi resumis longan diskutadon de la du skoloj pri libro de Sankta Jobo.

Ĉar la diskutado ne estas nur itala, sed vere internacia, mi pensas, ke artikolo povas eble interesi ankaŭ legantojn de E. K. kaj jen ĝi:

***

Itala Revuo per artikolo de Sinjoro Gigot malbone servas al la libro de Jobo. Laŭvole de la moderna hiperkritiko ĝi ja diras, ke *estas tre malcertaj la nomo de la aŭtoro kaj dato de la verkado;* kaj tamen oni konkludas tro malrajte, ke *ni povas certiĝi, ke tiu-ĉi libro ne estis verkita antaŭ la fino de la monarkio,* kaj konkludas *neante la historiecon de tiu-ĉi libro, kvazaŭ sur fundamento historia la aŭtoro estus brodinta, beligante, la rakontadon per subjektivaj elpensaĵoj.*

Kursivaj vortoj estas de mia kontraŭdiranto.

Por bone ekzameni ĉiujn pridiskuteblajn dirojn de tiu-ĉi artikolo estus necesa libro. Tamen estos sufiĉaj malmulte da periodoj por senvestigi la erarecon de la precipaj asertoj kaj neniigi la Gigot'an tezon.

***

La aŭtoro komencas per du malfacilaĵoj: malfacilo pri kunligo de la du ĉapitroj XXVII—XXVIII, kaj manko de l' nomo de Eliu en antaŭparolo kaj resumo. Pri la unua, se estus rajtduba nepovi aŭ nescii kunligi du ĉapitrojn, oni ankaŭ povus dubi pri multaj libroj de la Biblio, ekz. pri Josuo, juĝoj, Jeremio, Ezekielo, Danielo kaj pri Evangelioj mem, kiuj pli malpli havas antaŭ-post-dirojn kaj eksaltojn de unu al alia ideo; ĉar tio estis kutimo de l' Midras Aggadiko, tiatempa historio-komentario, en kiu per fidela rakontado de kelkaj agoj oni celis ne elverki historion, sed nur enradikigi verojn religiajn kaj moralajn en popoloj.

Pri la dua malfacilaĵo oni devus almenaŭ scii, ke „Jobo" estas libro historia-morala, ne teatra komedio, al kiu oni devas antaŭskribi la nomojn de aktoroj, por ke ĉiu plej facile ekkonu sian rolon.

***

Por pruvi ke la libro de Jobo apartenas al epoko pli nova, Gigot diras, ke *la literatura formo kaj poema karaktero* de tiu-ĉi libro *apartenas almenaŭ al la matur-aĝo de la hebrea literaturo.*

Sed kial ne al aĝo antikva? Ĉu ni ne havas en la Pentateŭko altegajn ekzemplojn de poezio, neniel malpli grandaj ol Jobaj ĉapitroj? Plie, ni ne plu posedas la originalan tekston de Jobo, pro tio el reskriboj kaj tradukoj ĝi povas esti iom ŝanĝita en sia ekstera formo. Kial do oni povas kaj kuraĝas nei al filo de Esaŭo, lumigita per la Dirivelacio, tion, kion oni konsentas al lia frato Jakobo mortanta? kion oni konsentas al Moiso? kion oni konsentas al Egiptanoj brutiĝintaj per fetiĉismo? Kial ne al Jobo? Ĉu ne vere, ke en Edomlando oni profesadis saĝon? (Jer. 4. 9. 7).

***

La temo, kiun oni trovas pritraktita kaj la maniero ĝin pritrakti, memorigas ideon pri societo jam de longe ekzistanta. Ĉu scius Gigot diri al ni la jarcenton, en kiu oni elstarigis la homan societon? Je l' tempo de la patriarĥoj, kiam Abrahamo kaj Isaako pilgrimadis en Egipton kaj Gerazon, ĉu ne estadis homa societo kun siaj reĝoj, kaj

reĝoj kun siaj subuloj? Kial do Gigot povas diri, ke por la elverkado de l' libro de Jobo estis necesa pli proksima epoko por estadi en plene starigita societo?

***

La problemoj de la homa vivo estas sendube antikvaj, sed ili ne povis esti pridiskutitaj kiel en la libro Joba, sen antaŭa sufiĉe longa religia historio, dum kiu la sciado de la tri amikoj iom post iom fariĝis vera klarigo pri okazoj de la vivo. Tiu-ĉi aserto transiru kiel duonvera; sed estos neniel necese postuli pro tio la VI-an jarcenton antaŭ Kristo, ĉar ĉu la problemoj pridiskutitaj en la libro de Jobo ne estas premio de la virto, puno de malvirto? Kaj ĉu tiu ĉi sciado ne egalvaloras la sciadon de Abrahamo, Isaako, Jakobo, praavo, avo kaj frato de Esaŭo, prapatro de Jobo? Ĉu ĝi ne egalvaloras la sciadon de la Pentateŭko? kaj se tian sciadon oni havas ankaŭ en la unuaj ĉapitroj de l' Geneso mem, kial ne estus ĝin koninta ankaŭ Jobo kelkajn jarcentojn pli malfrue?

***

Jobo ŝajnas sufiĉe instruita pri kutimoj kaj produktoj de la landoj malproksimaj. Alia bona tialo por nin certigi, ke Jobo vivadis en loko kaj tempo, kiujn li pentris. Ĉia homo estas filo de sia tempo kaj de sia patrujo: oni vivas per aero, kiun oni enspiras, kaj oni parolas laŭ vivo, kie oni staras. Certege ankaŭ dum patriarĥaj tempoj oni uzadis komercadi aŭ kun samlandanoj, aŭ kun fremduloj proksimaj kaj malproksimaj, kaj plej ofte oni komercadis per interŝanĝo de komercaĵoj. Kial do nei al Jobo, *viro riĉa kaj granda inter ĉiuj orientuloj* la konon pri kutimoj de l' fremduloj kaj pri iliaj komercaĵoj?

Sed pro kiaj kaŭzoj oni nomas la libron de Jobo subjektiva elpensaĵo? Tiujn-ĉi kaŭzojn Gigot tute ne nomas, sed li nur kontentiĝas eldiri, ke *ĝenerale oni neas historiecon de l' libro Joba, sed eĉ kredanto neas, ke ĝi estas tute historia.*

Klera Gigot, tiuj-ĉi estas argumentoj valoraj nur por infanoj, aŭ, pli taŭge, returnante al vi viajn vortojn: *tiaj argumentoj povas valori por tiuj sprituloj, kiuj ne povas*

konsenti kun malcerteco kaj deziras trompi sin mem per subjektivaj elpensaĵoj.

***

Kiu verkis la libron de Jobo? Gigot kaj aliaj *opinias*, ke tiun ĉi libron verkis iu hebreo. Nenio estas malpli verŝajne. Oni ja ne forgesu: *a)* ke la hebreaj verkoj ĉiam memoras pri Difavoroj al la Izraelidoj; sed tiu-ĉi regulo neforgesebla ĉe la hebreoj, tute mankas en la libro de Jobo. *b)* Oni ne forgesu malamikecon inter Edomidoj kaj Izraelidoj, kaj pro tio estas tute ne verŝajne, ke Edoma nobela historio estus verkita de hebreo, kiam Jobo mem sciis skribi kaj tiel perfekte paroladi. *c)* Nek estas supozeble, ke hebreo estus elserĉinta kaj verkinta historion de viro apartenanta al popolo malamika, kiu ĉiam danĝeris hebreojn kaj rifuzis al ili eĉ transiron per siaj vojoj. (Num. 20.)

Estas do evidente, ke ni devas kredi Jobon mem aŭtoro de sia libro.

Plue. Ni memoru, ke Dio, inspirinte la sanktajn verkistojn por skribado, ne forprenis al ili la natur-ecojn, nek ilian privatan sciadon, sed direktis ilian volon por skribigi tion, kio plaĉis al la Divero, altigis ilian ingenion por verkigi fidelege tion, kion per privata sciado ili konis; lumigis ilian inteligenton por konigi al ili la Diverojn, kiujn ili propraforte ne povis koni. Tiel la libroj de la S-ta Skribo havas ĉiujn homajn ecojn de libroj tiatempaj, kaj kune ĉiujn Diecojn necesaj al ilia celo.

Ĉu estas do kredeble, ke Dio ne estis uzinta la sciadojn kaj kapablecon de Jobo por ĉion inspiri al hebreo, kiu pri Edomidoj interesiĝis nur pro rilatoj amikaj kaj malamikaj pri Izraelidoj?

Estas do laŭracie supozi, ke la sama Jobo, kiu, malsana, deziradis elverki sur metalo kaj sur ŝtono siajn paroladojn, resaniĝinta kaj denove feliĉiĝinta estas elverkinta sian rakontadon pro memoro de la samlandanoj kaj el dankemo al Dio.

***

Starigite, ke Jobo estas la verkinto de sia libro, ni serĉadu la epokon plej proksiman de la verkado. Kiam

estadis ĉe la Edomidoj la kondiĉoj religiaj kaj moralaj, pentritaj en la libro de Jobo? Certe, ne dum la hebrea monarĥio, kiam la profetoj anoncadis kontraŭ Edom severegajn profetdirojn; kaj desmalpli post perdo de aŭtonomio ĉe loĝantoj de Seir'aj montoj.

Necesos do reiri la tempojn tre fruajn, kiam la virtoj de Abrahamo kaj Isaako ankoraŭ vivadis en memoro de Esaŭidoj. Estas necese pripensi epokon, kiam ankoraŭ daŭris religio de la patriarĥoj, inter gentoj. Kaj tiu epoko adis de Melĥisedeko al Moseo. Tiel oni povas rajte supozi, ke la libro de Jobo estas la libro plej antikva.

Tiuj-ĉi argumentoj estas certe ne grandvaloraj dise konsideritaj, sed kune antaŭmetitaj konsentas kun kristana fido ĉiulanda kaj ĉiutempa kaj kun la Eklezia dogmaro, per kiu oni enskribas la Joban libron inter la libroj veraj kaj Die inspiritaj, kaj nin povas kontentigi pli bone ol la argumentoj de la moderna hiperkritiko.

***

Nun tri demandoj:

Unua demando. Ĉu estas permesite detrui malnovan konstruaĵon tial, ĉar al iuj ne ŝajnas, ke ĝia stilo konsentas kun la personoj de kiuj oni ĝin kredas farita, kaj al centjaro, dum kiu oni kredas ĝin konstruita, se oni tamen konfesas ne koni la aŭtoron nek la jarcenton al kiuj la konstruaĵo apartenas? La saĝpensuloj tute neas. Do ni ankaŭ devas rifuzi la permeson detrui la aŭtoritaton de libro el la S-ta Skribo, kies vereco dia kaj homa estis kredata kiel certega ĉe multe da personoj kaj dum multaj jarcentoj, ĉar samtempe kontraŭuloj asertas, ke *la plej malklara demando pri la Joba libro estas pri ĝia aŭtoro kaj dato de ĝia elverkado.* Antaŭ ol sentenci, oni devas eligi lumilojn por forigi mallumon; ĝis kiam restas malfacilaĵoj, la problemoj ne solviĝas; promenante en mallumoj, oni ektuŝegas la objektojn; estante en mallumoj oni ne sidiĝas

por juĝi malproksimen mil' da mejloj,
kun vido kiel mano tre mallonga.

Dua demando. Ĉu ne ekzistas senŝanĝa principo ĉe leĝaro de ĉiulandaj popoloj civilizitaj: ke ĉiun kaŭzon oni

devas pritrakti per atestantoj kaj valorskriboj (latine: *instrumenta*)? Klera Gigot, kie estas atestantoj kaj valorsbriboj kredindaj en via bataletado kontraŭ la Joba libro? Ŝajnas, ke per *vortoj* oni ne povas fari rajtproceson kontraŭ kiu ajn, sekve nek kontraŭ la de Jobo libro, kiu malgraŭ ĉiu via titona penado, restados al sia Jobo kaj al sia jarcento, ĉar en duboj ĉiam estas plej bona la situacio de la posedanto (*melior conditio possidentis*).

Tria demando. Ĉu ni havas aŭ ne, Dicertan veron por nia eterna savo? Se jes, al kiu apartenas montri al la Kristanaro tiun ĉi veron? Al kiu lasis Dio la taskon liveradi tiun ĉi veron? Ĉu al la kritikuloj aŭ al sia Eklezio?

Kial do kiel unikan argumenton pri la libro de Jobo oni povas diri, ke la kritikuloj neakceptis la klarigojn elpensitajn pri tiu-ĉi libro? La valoro de la kritiko estas certe nobelega, eĉ necesega, sed neniel tiel senerara, ke ni povus certiĝi pri ĝiaj jesoj.

Eble estas bone, iafoje konigi al la katolikoj eĉ la ideojn plej kuraĝegajn, sed mi tute ne devas ilin disigi de sanigila periodo por singardigi ilin pri sofismoj pli danĝeraj ol utilaj. Oni antaŭigu eĉ preskaŭ ĉiujn teoriojn, sed ĉiam kiel studindajn hipotezojn, neniam kiel certajn faktojn. Fine oni neniam forgesu, ke unu el la ĉefreguloj por klarigi la malklarajn bibliajn tekstojn estas la

Analogio de la Fido.

P. BIANCHINI.

Simplaj notoj de Pilgrimo al la „Sankta Lando".

Pasintan someron ni havis la feliĉon partopreni en pilgrimado al Jeruzalemo, organizita de Mgr. PETARD, el Parizo.

Nia Gvidanto estas sindona prelato, kiu jam je la 27-a fojo kondukas vojaĝantojn al la Sankta Lando. Sekve li

bone konas la vidindaĵojn, kaj ankaŭ la malfacilaĵojn de tia pilgrimado.

Dum la nuna jaro, specialaj cirkonstancoj igis la vojaĝon iom malfacila, sed dank' al la sperto kaj zorgemo de nia direktanto, ni atingis la celon, malgraŭ la neatenditaj baroj, kiuj plurfoje ekstaris kontraŭ ni.

La unua estis la marista striko. Dum multaj tagoj, neeble scii, ĉu ni povos forveturi, aŭ ne! Fine post oftaj alternativoj de timo kaj espero, ni ricevas telegramon:

„Rapidu al Marseille: enŝipiĝos sur la „Niger".

Senprokraste ni ĵetas la necesaĵojn en du valizetojn, kaj ni forveturas al la stacidomo.

En Marseille ni alvenas ĝustatempe por ĉeesti la unuan diservon de la pilgrimado, en N. D. de la Garde. La vetero estas ideala. Tre impresiga estas la suprenirado sur tiu altega roko, kiu superrigardas la tutan grandiozan ĉirkaŭpejzaĝon. La nudaj ŝtonegoj brilas per varma orkoloro, kaj inter ili la okulo ripozas sin sur la grupoj de nigroverdaj marpinoj. Kaj antaŭ ni, la vasta, mirinde blua maro, al kiu ni baldaŭ konfidos nian sorton!

Sur la misteraj, perfidaj ondoj, Dio, gardu nin!

Ave, Maris Stella, protektantino, preĝu por ni!

En la bela kapelo de N.D. de la Garde la pilgrimantoj komuniiĝis. Poste okazis la Beno kun la Sankta Sakramento. Kaj, inter dolĉaj kantoj ni eliras, feliĉaj, el la preĝejo, por direkti nin al la haveno.

La 24an de Aŭgusto.

Jen ni estas instalitaj, tre komforte, sur la „Niger".

Sed ŝajnas, kvazaŭ la striko ne jam tute finiĝis! Oni aŭdas diskutojn, riproĉojn, sed kontentigan solvon oni ne atingas! Jam de longe forpasis la horo fiksita por la foriro, kaj ni ankoraŭ sidas, kvietaj, en la haveno. Venas la nokto . . . . kiom da tempo ni devos ankoraŭ atendi? . . . . Fine tamen, aŭdiĝas la bruo de la helico: la ŝipo formoviĝas! Ni ĉiuj ĝojas, ĉar ĉiu tempoperdo mallongigas nian restadon en la Sankta Lando.

Longa marvojaĝo estas agrabla, kiam oni havas, kiel ni, belan veteron, kvietan maron, kaj simpatiajn kunvojaĝ-

antojn. Nia pilgrimantaro konsistas el 22 pastroj kaj 23 gelaikuloj. Kelkaj el ili estas kleraj profesoroj, kun kiuj estas tre interese paroli. Aliaj estas tre spritaj, kaj ilia gajeco ŝajnas komunikiĝema. Ĉe aliaj, ni admiras profundan, kortuŝantan piecon . . .

La 25-an de Aŭgusto.

Ĉe noktomezo, subite, la ŝipo haltis. Iom da emocio; malkvietiga ideo trafulmas nian kapon: ĉu eble la ŝipistoj denove strikas? Ĉu estus ia difektaĵo en la maŝino? . . .

Ni kuras al la fenestreto: sur la inko-nigra, movetanta akvosupraĵo ŝvebas densa nebulo. Estas io timiga en tiu mistera abismo, sur kiu ni senmove flosiĝas, kvazaŭ perditaj en la mallumo.

Baldaŭ, — alia surprizo — ni konstatas, ke ni ekiras, sed en la direkto de Marseille!

Efektive, frumatene, ni revidas antaŭ ni la longan vicon da lumoj sur la Marseille'a haveno!

Promenante sur la ferdeko, ni renkontas pastron:

„Feliĉe", li rimarkas, „la sinjorinoj jam dormadis kaj nenion sciis pri la afero, ĉar alimaniere estus eble okazinta ia paniko!"

„Sed kio okazis?"

„Kiel vi vidis, densa nebulo, kiu igis la veturadon tro danĝera inter la rokoj de la „Golfe du Lion". Ni do revenis, ĝis kiam ni klare vidis la lumturon de Marseille, kaj nun la vetero heliĝas, kaj ni povos sentime antaŭeniri! Tute simple."

Estas dimanĉo. Sur la ferdeko, la ŝipistoj aranĝis kapeleton, en kiu oni diros la meson. La vetero estas belega. Nenio estas videbla, sur la blua, ĉiela vastaĵo, krom kelkaj blankaj mevoj, kiuj ŝvebsekvas la ŝipon; sur la blua senlima akvo vidiĝas nenio krom la ŝaŭma sulko de nia ŝipo, aŭ, ĉi tie kaj tie, la brilnigra dorso de ia delfeno ludanta en la sunlumo. Ĉie regas solena silento kaj kvieto. Ĉu povus ekzisti pli bela preĝejo por niaj dimanĉaj preĝoj?

La 26-an de Aŭgusto.

En unu ekstremaĵo de la ŝipo, kiel ankaŭ sur la ferdeko, estas ĉambretoj, en kiuj oni starigis altaron. Tie, la 22

pastroj-pilgrimantoj, unu post la alia, ĉiutage faras la Sankt-an Oferon. Estas por ni granda ĝojo kaj vera privilegio pasigi ĉiumatene duonhoron en la ĉeesto de nia Savinto, kaj ni memoras la disciplojn, kiuj ĝoje enlasis Jezuon sur sian ŝipeton! Meksikana Sinjorino tre regule ĉeestas ĉiutage al la diservo. Ŝi aspektas tiel fervora, tiel pia, ke volonte mi dirus al ŝi vorton de kristana frateco, sed ho ve! ni tute ne povas interkompreniĝi! Dum la tuta vojaĝo, nur unu gesto, unu simpla rigardo devos sufiĉi por esprimi nian koran kunsenton. Kiom necesa estas Esperanto!

La 27-an de Aŭgusto.

La „Niger" haltas du horojn antaŭ Napoli. La ĉarma urbo etendiĝas antaŭ ni, bananta en la lastaj purpurradioj de la subiranta suno. Ĉirkaŭ nia ŝipo balanciĝas svarmo da barketoj plenaj de homoj, kriantaj, vokantaj, ekscitite puŝantaj unu la alian. Sur unu ŝipeto, blankvestita junulino kantas, gracie movetante sian ventumilon. Vere poezia pentraĵo...

Noktiĝas. La maro estas glata kiel spegulo: sur la nigra supraĵo la luno ĵetas longan strekon da fajreroj. Kaj el la ŝipo altiĝas la vesperpreĝo de niaj pilgrimantoj:

„En Viajn manojn, Sinjoro, ni konfidas nian spiriton"...

La 28-an de Aŭgusto.

Ni alproksimiĝas al Sicilio: jen Stromboli, kun sia nubeto da fumo ĉirkaŭ la fiera frunto. Ni veturas inter Charibdo kaj Scilla... feliĉa antikva tempo, kiu poeziigis eĉ sian timon! Por ni, la prozuloj, tiuj antikvaj timegaĵoj estas simple du el tiuj rifoj, kiuj tiel ofte interpunktos nian marvojon!

Je tagmezo ni ekvidas Messina'n. La aero fariĝas peza, varmega. El la Sudo preme flugas nigraj minacantaj nuboj. La trairado en la markolo de Messina prezentas mirigan kontraston inter la rava, poezia pejzaĝo kaj la amasoj da ruinoj, kiuj kovras la du flankojn de la markolo. Ni preterglitas vilaĝon post vilaĝo, — ĉie, disrompitaj muroj, sentegmentaj domoj. Estas necese travojaĝi tiun malfeliĉan regionon por plene kompreni la gravecon, la amplekson

de la katastrofo, kiu detruis la grandan urbon kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn.

Jen la urbo-mem, vastega spaco, inter kies ruinoj vidiĝas, ĉi tie kaj tie, vico de malaltaj ladkovritaj domoj. Eĉ sur la flankoj de la monto oni rimarkas tiujn strangajn vicojn de ladaj tegmentoj — novaj konstruaĵoj starigitaj por ŝirmi la restantajn enloĝantojn. La urbo certe aspektis majesta, se oni juĝas laŭ la altaj palacofasadoj, kiuj staras, kiel grizaj fantomoj, laŭlonge de la marbodo. La suda pinto de Calabria estas, en tiu sezono, nuda, seka. La krutaj rokoj elstaras fiere el la maro, kaj la itala suno donas al ili dolĉan orkoloron. La maro alprenas mirindan, violetan nuancon.

La bordo iom post iom malproksimiĝas. Brungriza, varmkolora ĝi etendiĝas nun en la horizonto. Ni pasigos la nokton sur la vasta Iona Maro. La ŝipo komencas ruliĝi; la vojaĝantoj havas melankolian mienon.

La 28-an de Aŭgusto.

Hodiaŭ, denove, la maro estas tute lazura. La aero, mole varma, dolĉe karesas la vizaĝon.

Prave oni rekomendas longan marvojaĝon al personoj lacigitaj de akra laboro, aŭ al tiuj malfeliĉuloj, kiujn senfortigis turmentigaj priokupoj. La freŝa marventeto, la perfekta ripozo refortigas la lacan cerbon, kaj repacigas la ekscititajn nervojn.

Dum nia pilgrimado, ni povas diri, ke ni plene ĝuis kaj dankeme ricevis la multajn, diversspecajn benojn, per kiuj Dio superŝutis nin. Por la korpo — viviga aero, abunda nutraĵo, agrabla ripozo. Por la intelekto, interparoloj kun afablaj, kleraj personoj.

Kaj speciale por la animo — kiom da benoj! La ekzemplo de tiom da fervoraj Kristanoj, kaj ĉefe la ĉiutaga Komunio... Kiom da fortoj ni nun enprovizigas por niaj estontaj laboroj!

La 29-an de Aŭgusto.

Hieraŭ vespere, en la duonlumo, ekaperis la pinto de l' Peloponezo. Hodiaŭ, vekiĝante, ni ĝuas la plej dolĉan, riĉkoloran sunleviĝon! El la ĉielo brilas ruĝo kaj oro, kiuj respeguliĝas sur la trankvila maro...

La 29-an de Aŭgusto.

Tiun matenon ni alvenis al Ateno. Por viziti la faman urbon, ni havas nur duontagon (pro la tempo perdita en Marseille). Ni do rapidas; spite al la brulanta meztaga, mezsomera suno, ni grimpas, laŭ senombra vojo, al la Akropolo. Survoje ni rimarkas la „Vojo de la Apostolo Paŭlo", kiu kondukas al la Areopago. Tie, laŭ la Biblio, Sankta Paŭlo predikis la Evangelion al la Atenanoj.

Strange luma estas ĉio en tiu mirinda lando. Eĉ la ombro de la marmoraj temploj ŝajnas hela. Kaj en la pejzaĝo la koloroj harmoniiĝas kun speciale dolĉa riĉeco. Ni forgesas la varmon, kiu brulas nian vizaĝon, ni ne atentas la polvon en kiu ni vadas, kiam ni vidas la mirindaĵojn de la greka arto, kaj la memoraĵojn de iliaj herooj. Jen la „Malliberejo de Sokrates"; jen vico de Kariatidoj... El tiu belega Akropolo la Turkoj faris pulvejon. Unu tagon ĝi esplodis, kaj la rezulto de tiu malfeliĉo estis la difektigo de senprezaj ĉefverkoj.

Promenante tra la moderna urbo, ni tre amuziĝas pri la moderngrekaj surskriboj, kiuj kelkfoje prezentas francajn vortojn vestitajn en grekaj literoj. Sur butiko de sukeraĵisto mi vidis jenon: Pti phour. Alie troviĝas: Ai laiph (High life)!

La 30-an de Aŭgusto.

Post trairo de la Egea Maro ni atingis Smirno'n. La alveno tie ne okazis sen ia emocio, ĉar pro la milito italo-turka, la jam malfacila eniro en la haveno de Smirno prezentas nuntempe specialan danĝeron. Torpedoj kuŝas en diversaj lokoj, kaj ni bezonas kondukistan ŝipeton por nin gvidi inter la danĝeraj lokoj. Fine ni atingas la havenon. La eliro el nia ega „Niger" en la etan ŝalupon, kiu albordigos nin, postulis iom da gimnastiko, ĉar la ondoj forte skuas la boaton! Feliĉe la trairo ne estas longa. Baldaŭ nia aro komencas serpenti tra la mallarĝaj stratoj de Smirno. Ni vizitas la francan ĉefpreĝejon, apud kiu staras alta ligna kruco, alportita ĉi tien en antaŭa pilgrimvojaĝo de nia Direktanto. En ĉiu vojaĝo organizita de Mgr. Potard, li kunprenas grandan krucon, kiun la pilgrim-

antoj kunportas laŭlonge de la Via Dolorosa en Jeruzalemo. Ĉe ĉiu stacio de tiu Kruciro okazas preĝo kaj prediko: tio estas la plej kortuŝanta ceremonio de la tuta vojaĝo.

Vidante la agemecon de la Kristanoj en Smirno, ilian fervoron kaj ilian bonfaremon, mi rememoras la vortojn de S. Johano: Skribu al la anĝelo de la Eklezio de Smirno:.. Mi konas vian suferon kaj vian malriĉecon, sed vi estas riĉa... Ne timu,... estu fidela ĝis la morto, kaj mi donos al vi la kronon de vivo."

Smirno ankoraŭ nun estas riĉa, riĉa laŭ kristanaj verkoj. Kontraŭe, kvazaŭ kiel kontrasto, la apuda Efezo, la granda, bela urbo, kuŝas nun en ruinoj. Efektiviĝis tiu alia parolo de la Apokalipso: „Skribu al la anĝelo de Efezo: Mi havas ion kontraŭ vi: Vi forlasis la unuan fervoron. Pentu do,.. se ne, mi venos kaj forprenos vian lumon...

La sorto de tiuj du urboj estas kvazaŭ praktika leciono por ni: ni estu ĉiam fidelaj al la graco.

Post interesa promenado tra la urbo, oni kondukas nin al la Kolegio de la Franciskanoj. Kun ĝojo ni ekvidas tie tablon kovritan per belegaj vinberoj, kaj glasojn da freŝa akvo. Nur post vojaĝo en Oriento oni povas plene kompreni la valoron de freŝa akvo! Tiel maloftaj estas la fontoj, ke en multaj lokoj oni devas kolekti en cisternojn la pluvakvon falantan en la printempo, kaj el tiu akvo oni trinkas dum la tuta somero. Ĝi ne estu tre bongusta, tamen eĉ por la dono de freŝa akvo nia kompatema Savinto promesis rekompencon.

Tute refreŝigitaj per la agrabla manĝeto ĉe la bonaj Patroj, la pilgrimantoj daŭrigas sian promenadon, vizitante la bazarojn. Smirno donas la impreson de tute orienta urbo. En la mallarĝaj stratetoj de la bazaro, oni pene preterpasas vicojn da kameloj peze ŝarĝitaj, amasojn da homoj en pitoreskaj kostumoj, laŭte interdiskutantaj. Iliaj krioj ŝiras la orelon.

Dum nia kelkhora restado en Smirno ni havis la privilegion vidi la ĉefepiskopon. La respektinda prelato, kiu nun sidas sur la seĝo de la martiro Polikarpo, afable salutis ĉiun el ni, preĝis kun ni, kaj montris al ni relikvon de

de lia glora antaŭanto, memorigante nin, ke al S. Polikarpo ni ŝuldas la sendon de S. Ireneo al nia propra lando.

Sed jam ni devas reiri al nia flosanta loĝejo! Sur la „Niger" oni anoncas al ni moviĝeman maron. La maristoj forprenas la grandan tolaĵon, kiu ŝirmas la supran ferdekon; oni fermas la fenestretojn. Ĉar, pro la milito, la Turkoj ne lumigas la lumturojn, ni iras singarde en tiu regiono.

La 31-an de Aŭgusto.

Longan tempon ni atendas ĉe la Dardaneloj, ĝis kiam estas plenumitaj ĉiuj oficialaj pritraktaĵoj. Diversaj detaloj montras, ke la idealo de la pacifistoj ne jam estas atingita! Jen la turkaj kanonoj, kiuj ŝajne celas la preterpasantajn ŝipojn. Jen la turka militŝiparo, atendante la malamikon... Oni ne permesas al ni eniri nokte en la havenon de Konstantinoplo. Ni devas atendi ĝis tagiĝo.

La 1-an de Septembro.

La polico de la granda urbo estas severa hodiaŭ: ĉe nia albordiĝo, oni donas specialajn ordonojn. Ni ne komprenas tiun nekutiman severecon, ĝis kiam oni klarigas al ni, ke ĵus enĵetis sin en la urbon tumulta soldataro, eble iom ebria, — kaj tuj oni suspektis ian ribelon...

Sed ĉiujn epizodojn de la alveno ni forgesas ĉe la ekvido de tiu majesta konstruaĵo, kiu iam estis kristana ĉefpreĝejo: Sankta Sofia. Sub tiuj altegaj volboj oni sentas sin trapenetrata de admiro. Sed malĝojo premas la koron, ĉar nia Savinto ne plu estas adorata en tiu antikva sanktejo. Tra la grandiozaj galerioj ne plu sonas la laŭdoj al Kristo. La kristanaj bildoj estas surpentritaj per turkaj desegnaĵoj: apenaŭ vidiĝas, ie, resto de kristana pentraĵo.

„Ĉu vi konas la autaŭdiron", rimarkis enlandulo al ni, „ke Sankta Sofia dum la nuna jaro refariĝos kristana?"...

Restas al ni malmulte da tempo por viziti la urbon. Ni eniras moskeon, en kiu staras vicoj de malgrandaj tomboŝtonoj. Tie kuŝas la 17 infanoj de ia sultano. Li mem, kun sia edzino, havas tombon tute apude.

Je la deka, vespere, ni eliras el la haveno, kaj forveturas sur maltrankvila maro. Nia ŝipo veturas malproksime de la insuloj kaj rifoj, sur kiuj brilas nenia lumturo. Ni pensas

pri la ŝipoj, kiuj pereis en la mallumaj ondoj: sur la tablo, en la ŝipsalono, estas bildoj kaj priskriboj pri la terura katastrofo de l' Titanic, kaj tio alkondukas malagrablajn ideojn!

La 4-an de Septembro.

Antaŭ ni aperas la fama insulo Rodo, nun okupita de itala militistaro. Antaŭ la haveno staras garde du imponantaj italaj militŝipoj. Kelkaj soldatoj venas al nia ŝipo, kaj ni admiras ilian belan, fieran sintenadon. Tie, en Rodo, ni adiaŭas tutan grupon da junaj fratoj (Frères de la Doctrine Chrétienne), kiuj vojaĝis kun ni, de post Konstantinoplo, kaj kiuj dediĉas sin al la instruo de Orientaj infanoj. Multaj el ili estas francoj, kiuj ne povis resti en sia patrujo. Kiam la malamo de la mondo dispelas la Kristanojn, la lumo de la Evangelio disvastiĝas en multaj landoj...

Beyruth, la 6-an de Septembro.

Denove ni devis pasigi la nokton sur la maro, ĉar ne estas permesite eniri nokte en la havenon.

La Orienta imago komparis la ĉarman urbon, kiu etendiĝas antaŭ ni, al juna sultanino, mole ripozanta inter la floroj. Efektive, vidita de la haveno, Beyruth estas tre plaĉa. Laŭlonge de la pitoreska bordo, sur kiu ludas kaj reŝprucas la moviĝemaj ondoj, kuŝas blankaj dometoj, elegantaj palacetoj, inter ombroplenaj ĝardenoj. Malantaŭ la urbo altiĝas la montoĉeno Libano, ofte kovrita de neĝo.

Ĉe la elŝipiĝo, ni aŭdas, ke en Damasko, nia nuna celo, laŭ nia programo, — regas la ĥolero! Kion fari?

Nia Direktanto iras serĉi informojn. Intertempe ni instaliĝas en bona germana hotelo, kie ni admiras la interesan ĝardenon. Citronarboj kovritaj de fruktoj, arbetoj kun brilruĝaj, liliformaj floregoj, fajroruĝaj granatoj, kiuj gaje interpunktas la malhelverdan, riĉan foliaron, ĉio brilas sub la ardanta orienta suno.

Dum mi promenadas inter la rokoj apud la lazura maro, aliaj pilgrimantoj faras ekskurson sur la monto Libano; aliaj kuŝas en melankolia senkuraĝo: ili timas, ke ni eĉ ne povos iri al Jeruzalemo! „Kiu scias, ĉu al ni estos perme-

sate eĉ eliri el tiu ĉi loko? Ĉar, ŝajnas, ke la malsano jam aperis ĉi tie!"

Miaj filoj iras viziti la Universitaton: Beyruth havas la privilegion posedi du medicinajn Fakultatojn, unu amerikanan kaj unu francan. La diplomitoj de tiu lasta Fakultato havas la rajton esti kuracistoj eĉ en Francujo mem.

Ĉar la ĥolero malhelpas nin iri al Damasko, ni aliigas nian programon, kaj iros ŝipe al Kaifa.

La 8-an de Septembro.

La anglo-turka ŝipo „Assuan" kunprenas nin, — sen karanteno — kaj sekvas la interesan bordon de Fenicio, sur kiu laŭvice vidiĝas Tyr, Sidon, Sarepta, kaj aliaj rimarkindaj lokoj.

La alveno en Kaifa estis pitoreska. Kiaj krioj! Kia puŝegado! Malfacila estas la ensalto en la albordigantajn ŝipetojn, kiuj dancas sur la ondoj; sed fortaj viroj ekkaptas la hezitantan vojaĝanton, kaj kvazaŭ ĵetas lin en sian lokon. Kiam la barkoj estas plenaj, la remistoj vigle klopodas, sed pene kontraŭstaras la ondojn; por sin kuraĝigi, ili ritme elĵetas strangajn, raŭkajn ekkriojn.

Estas absolute mallume, kiam ni metas la piedon por la unua fojo sur la teron de Palestino. Sed oni ne lasas al ni la tempon pripensi pri tiu privilegio. Surdigita de la arabaj krioj, puŝata ĉiuflanken de la amaso da enlanduloj, kiu sin premegas sur la haveno, mi elsaltas el la boato, kaj feliĉe sen malagrablaĵo atingas la bordon. Malfacile estas trovi unu la alian, sur la urba placo, en la densa mallumo! Svarmoj da homoj krias, kuras; veturiloj trarapidas en ĉiuj direktoj la popolamason, brue kraketante sur la terure malebena pavimo. Post malespera baraktado en tiu kapturniga tumulto, ni fine ektrovas la al ni destinitajn veturilojn. Fine ni povas sidi kaj ĉirkaŭrigardi sur la strangaj scenoj. Ĉe la flankoj de la placo, apud la domoj, vidiĝas, sub la lumo de kelkaj oleolampoj, viroj kaŭrantaj sur la pavimo, fumante la altan „narghileh" kaj aŭskultante la akrajn sonojn de malnova fonografo. Tra la malfermitaj pordoj vidiĝas kafejoj plenaj je klientoj. Tie mi devas noti, ke ne eĉ unu ebriulon ni vidis dum nia tuta vojaĝo. Viroj,

en Palestino kiel en Egipto, tre ŝatas kafon, teon kaj akvon, kaj tamen ilia fizika forteco estas rimarkebla.

Mirinde estas, ke en tiu nigra nokto, la veturiloj ne frakasiĝas kontraŭ la muroj ĉe ilia fulmrapida trakuro tra la mallarĝaj urbopordoj!

La vojo al Karmelo supreniras, polvokovrita, inter olivujoj kaj palmarboj, kies malklaraj formoj elstaras kiel fantomoj en la mallumo, ĉe ambaŭ flankoj de la vojo. Poste ni nenion plu vidas, ĝis kiam la veturiloj haltas, sur la placo antaŭ la monaĥejo.

Ni loĝos ĉe la Karmel'aj Patroj. La monaĥejo havas severan aspekton. Longaj, nudaj koridoroj kun vicoj da simplaj sed puregaj ĉeloj. En vastega volbita halo la bonaj Patroj estis starigintaj longajn vicojn da benkoj kaj tabloj, lumigitaj de tri grandaj petrollampoj ĉe la plafono. En tiu severaspekta loko la Patroj gastame preparis por la lacaj pilgrimantoj refortigan vespermanĝon, kiun ni tre ŝatis post la longa vojaĝo.

Poste okazis solena Beno en la monaĥeja preĝejo kaj vizito al la groto de Elio. Ankoraŭ nun Elio estas speciale respektata kaj eĉ timata de la ĉi tiea popolo. Oni solene dediĉas al li infanojn, al kiuj, en la tago de tiu ceremonio, oni tondas la harojn kiel signon de tiu dediĉo.

(*Estas daŭrigota.*) RAMO.

Noto de la Redakcio:

„Espero Katolika" opinias sin tre honorata per la ensendo de tiel bela artikolo de tiom sperta aŭtorino, kiu pliriĉigis la Katolikan literaturon Esperantan per multaj bonstilaj verkoj.

Daŭre „E. K." sin rekomendas en la bonvolemo de sia talenta kunlaborantino.

La Katolika Gazetaro kaj Katolika Telegraf-Oficejo.

Dum la lasta duona jarcento la mondo aliformiĝis tiel, kiel antaŭtempe neniam estis vidate. La moderna kosmo-

polito vivadas en tempo de teĥnikaj mirakloj. Senĉese li aŭdas pri novaj esploroj. Senĉese li vidas novajn, tre praktikajn eltrovojn, kreataj de la homa genieco. Tiu ĉi ega mondaliformiĝo, kiu neniun mirigas, necese sentigis sian influon je la gazetaro.

La gazetaro ja estis kaj ankoraŭ estas la reflektilo de la mondscenejo en kiu ĝi ludas gravan rolon. Ni povas kviete diri: gravegan kaj povan rolon, plialtigitan ankoraŭ, kiam la gazetaro povis fine disponi pri ilo por sciigi informojn en kiel eble plej mallonga tempo; kiam la gazetaro povis labori per telegrafo kaj telefono.

Certe, jam de jaroj la katolika mondo komprenis la signifon de la gazetaro, sed la evolucio kaj kelkaj nepraj kondiĉoj de la nuna gazetaro estis bedaŭrinde ne sufiĉe taksataj; ĉar ĝis nun la katolika mondo tro multe enkalkulis la literan vorton en la gazetaro kaj malmulte ĝian timindan kaj novan kunregnanton, la telegrafon.

La pli kaj pli kreskanta influo de la telegrafo kaj telefono en la gazetaro multege plialtigis la signifon de la internaciaj telegraf-agentejoj por la gazetaro kaj ilian influon en la gazetaro. Bedaŭrinde la katolika gazetaro spertas je sia malprofito, kiamaniere tiuj-ĉi agentejoj utiligas tiun akiritan povon; ke tiuj-ĉi tute troviĝas en la manoj de la antiklerikala Judaro kaj Framasonaro; ke tiuj-ĉi agentejoj tendence redaktas la sciigojn, rilatantajn al katolikaj interesoj; ke tiuj ĉi fine, ĉion, kio okazas profite aŭ favore al la katolikoj, prisilentas aŭ falsas.

Oni ne miros pri tio, kiam oni nur konatiĝos kun la jeno:

La Brusela Loĝio I en la „Rue du Persil" tute influigas la tiean filion de la Wolff-Oficejo. Tio klare elmontriĝas el la kalumniaj kaj mensogaj sciigoj, transportataj al ni el Belgujo pri la katolika registaro kaj registaranoj dum la tuta tempo de ilia oficumado; tio plej klare montriĝas dum la elektoj kaj per ilia kriego tra la tuta mondo: „à bas la culotte".

En Hispanujo la oficejo Wolff-Reuter nomiĝas Agenzia Fabbria. Kiom la loĝia influo tie same superas, pruvas sufiĉe la ĉiamaj kaŝemaj atakoj kontraŭ ĉiuj katolikaj movadoj

en Madrido kaj en tuta Hispanujo. Ĉi tie ni ne volas paroli pri tiu tre bedaŭrinda Ferrer-kabalo, ĉe kiu okazo la framasonaro kaj ĉiu, kiu Romon malamas, perforte maluzis la telegrafagentejojn je la plej senhonta maniero. Ni ne volas ankaŭ paroli pri la lastjaraj okazintaĵoj, sciigitaj el tiu malfeliĉa Portugalujo; tiaj kalumniaj agadoj estas tro klaraj al ĉiu por okupi nin pri ili.

Kiel estas en Hispanujo, tiel estas ankaŭ en Italujo, kie estis starigita la Roma telegrafagentejo „Agenzia Stefano". Tie pli ol la reĝo mem, la urbestro Nathan povas esti nomata (ĝis sia elekto li estis grandmajstro de la Itala framasonaro,) la estro de la tiama kaj nuna Giordono-Bruno-amasaĉo. Skandalsciigoj pri la pastraro, pri monaĥejoj, k. t. p. estas distelegrafataj de la Wolff-oficejoj por kontraŭparoli ilin post kelkaj tagoj, post kiam ili faris kompreneble la necesan efikon. Kaj kio ajn ne estas mensogata pri Vatikanaj aferoj kaj disvastigata per la fadeno? Ne unu semajno preteriras sen tiaj sciigoj, kiuj havas la stampon de la fabrikinto.

En Parizo la Wolff aŭ Havas-Oficejo estas kiel la aliaj, tute dependa de la ordonoj de la .·. Granda Oriento. Ni nur memoras la aferon Montagini-Clemenceau, kiel oni penadis malreputaciigi nian Papan Moŝton kaj Lian Ŝtatsekretarion. Dum la registado de Combes oni povis ĉiam legi pri la obstina registo de la gemonaĥejoj, neniam pri la perfortado de incitita kanajlo aŭ bando da soldatoj kontraŭ la sendefendaj gemonaĥoj.

Tiu-ĉi agadmaniero okazas ĉie, kie la Wolff-oficejo estas la sama, ankaŭ en Londono — oficejo Reuter, Kopenhago--Stokholm — oficejo Ritzau, Peterburgo — Norda Telegrafagentejo. Ĉiuspeca liberalismo, ankaŭ de sciencaj allogoj kaj kunvenoj, estas subtenata; ĉio, kio koncernas katolikajn aferojn, estas subpremata kaj cetere ankoraŭ kalumniata kaj nigrigata, jes pugnodikaj mensogoj estas disvastigataj!!!

Kolonojn kaj kolonojn plenaj je sensaciaj kaj tendencaj sciigoj ni povus ankoraŭ aldoni, kiuj estas ĉiutage distelegrafataj de la diversaj telegrafagentejoj. Se la katolika gazetaro nur povus senprokraste kontraŭstari tiajn sciigojn

per informoj, apogantaj verecon, la nunaj agentejoj estus baldaŭ devigataj aliigi siajn sciigojn, aŭ almenaŭ iomete malpli mensogi pri katolikaj aferoj.

Sed ho ve! la katolika gazetaro estas ĝis nun devigata utili la servojn de sia malamiko, ĝi estas devigata oferi ĉiujare milionojn kaj milionojn por kiuj ĝi ricevas materialon, kiu estas plej ofte neuzebla, eĉ danĝera al la interesoj, kiujn ĝi devas defendi. La katolika gazetaro devas toleri, ke malamiko nestkonstruiĝis en propra fortikaĵo, kiun ĝi mem devas subteni kaj kiu estas ĝis nun nepre necesa al ĝi.

Nu, ni demandas vin: ĉu estos permesate, ke tio tiamaniere daŭriĝas? ĉu estas permesate, ke framasona kaj juda aro tiranadas nian plej fortan ilon kaj plej profitas de tio? Ne, milfoje ne!!!

La estanteco devigas nin, instigas nin, ke ni donu al nia katolika gazetaro la plej necesan, la plej urĝan ilon, kiu al ĝi mankas, ke ni donu al nia katolika gazetaro KATOLIKAN TELEGRAF-OFICEJON. Ĉar sen tio, nek nia eklezio, nek la katolika mondo povas esperi tiujn servojn de nia gazetaro, por kiuj ĝi estas kreata.

Pro tio la Katolika mondo fine donu al la katolika gazetaro:

„KATOLIKAN TELEGRAF-OFICEJON".

„Katolika telegraf-oficejo — kiel skribis D-ro G. BAUMBERGET, la ĉefredaktoro de la „*Neue Zürcher Nachrichten*" — iĝis neceso por la katolika gazetaro, neceso ankaŭ por la katolika eklezio, por la katolikaj registaroj, por la katolikaj parlementgrupo kaj partioj, neceso por la tuta katolika mondo. Nur ĝi povos ebenigi la almontritajn malprofitojn kaj mankojn; nur ĝi povos certigi sciigan deĵoron, kiu kompensas la suprenomitajn korpojn kaj iliajn interesojn, nur ĝi povos denove akiri por la katolikeco la respekton en la ĝenerala publiko, kiu ankaŭ en la nuna tempo apartenas al ĝi kaj denove enkonduki tiun ĉi katolikecon en ĝia kreado kaj laborado interne kaj ekstere en la vasta publika opinio de la civilizita mondo."

Ni tute subskribas tiujn ĉi vortojn de D-ro Baumberger,

jes ĝi estas urĝa neceseco, ke ni posedas propran telegraf-oficejon. Ĉar tiaj oficejoj jam estis starigitaj en diversaj landoj por certaj regionoj; ĉar troviĝas katolikaj viroj sur la tuta terglobo kun eksterordinara talento, plenaj je amo por vero kaj justeco, kiuj volos certe kunlabori por doni al nia gazetaro la plej necesan, kio mankas al ĝi, — ni neniel dubas, ĉu la ebleco por starigi katolikan telegraf-oficejon certe ankaŭ efektiviĝos.

Kia estos la funkciado de nia oficejo, en kiuj landoj ĝi disvastiĝos, kiuj sciigoj telegrafe, telefone aŭ letere estos sciigataj, kiel estos la financa flanko, pri tiuj-ĉi kaj ankoraŭ pliaj punktoj ni parolos en nia venonta artikolo. Nun ni nur deziras, ke la katolika gazetaro, la katolika mondo donu sian apogon.

La katolika gazetaro donu sian apogon utiligante estonte niajn servojn, donante ankaŭ sciigojn al niaj landaj oficejoj, helpante al ni financmaniere en nia entrepreno.

La katolika mondo donŭ ankaŭ sian apogon. Ni petas la helpon de tiuj personoj, kiuj per sia talento povos aktive kunlabori kun ni; ni petas la apogon de tiuj, kiuj povos subteni nin per siaj kapitaloj.

Kiam ni estos tute certigataj pri tiu ĉi kunlaborado, tiam niaj antaŭaj faraĵoj, (kun kiuj ni jam komencis i. a. nia starigita Munĥena oficejo jam interrilatis kun la plej multe da katolikaj germanaj gazetoj) akiros pli vastan, pli gravan formon.

Do oni ne prokrastu, sed sciigu kiel eble plej baldaŭ, ke oni intencas kunlabori ĉu aktive ĉu finance, al la tradukinto de tiu ĉi artikolo, kiu zorgas pri plua trasendo.

Ju pli da kunlaborado des pli baldaŭ nia plano efektiviĝos.

La lingvo, en kiu tiu ĉi artikolo estis verkita, jam diras, kiu estas la kondukanta penso de nia telegraf- kaj korespond-oficejo. Ĉar Esperanto pruvis, ke ĝi povas konformiĝi al ĉiuj postuloj de la tempo; ĉar ĝi pruvis dum niaj internaciaj katolikaj kongresoj, ke ĝi estas kaj ankoraŭ estos bonega ilo por interrilati kun ĉiuj niaj samreligianoj tutmondaj; ĉar Esperanto pruvis, ke ĝi allerniĝas tre facile

kaj kaŭzas nenian malfacilecon por la interkomprenebleco de la diversaj nacioj, ni kredis, ke ni devis utiligi tiun ĉi elpensitaĵon de la lasta kvarona centjaro. La Esperanto en servo de tiu ĉi katolika afero donos — se oni nur iomete konatiĝos kun la Internacia Katolika Esperantista Movado, — al nia oficejo ankoraŭ pli gravan forton, per kiu ni posedos la plej modernan internacian oficejon de la tuta mondo.

Hodiaŭ la katolika mondo fariĝas movema en ĉiuj landoj, tiel oni povas vidi vivplenan katolikan vivon, ĉie oni ekbatalas kontraŭ la malkredo kaj malbonmorigo de la mondo; se ni tamen volas venki, se ni volas sukcese batali, ni devas havigi tiun forton al nia plej potenca ilo por kiu estas neeble sin defendi kontraŭ sia tiel forta malamiko; sed ni donu al nia gazetaro — ni denove ripetas — propran katolikan oficejon. Neniaj pli bonaj vortoj estas pli taŭgaj por tio ol tiuj de la Nederlanda social-demokrata estro kaj parlamentdeligito Troelstra, kiu tiel bonege diris pri sia social-demokrata gazetaro: „Nek penado nek mono estas tiel utile elspezata. Se por nia gazetaro estus necesaj milionoj, dekmilionoj, ili devas veni; oferoj, alportataj al tiu laborado, estas bone alportataj."

Ĉu nun estos nia voĉo de iu, kiu vokas en la dezerto?

La provizora Komitato de la katolika
Telegraf-Oficejo:

Jozefo KRAL,
Munĥeno, Hofstatt 6.

Petro JANSSEN,
Amsterdamo, Nieuwendijk 183.

Estimataj Samideanoj.

Ni insiste petas al ĉiuj abonantoj de „Espero Katolika" traduki tiun ĉi artikolon por la nacia katolika gazetaro. Oni same subskribu la tradukitan artikolon kaj sendu provizore la sciigojn k.t.p. ĉu de la gazetaro, ĉu de privataj personoj al S-ro Janssen, kiu liveros ĉiujn pluajn donitaĵojn koncerne tiun ĉi aferon.

Se eble la tuta artikolo estus tro longa por iu gazeto, ni petas, ke oni publikigu tion, kio laŭ propra opinio estos taŭga aŭ utila por ĝenerala publikigo rilate al la nacia kutimo.

Karaj Gesamideanoj, la efektiviĝo de nia oficejo donos certe gravan puŝon al nia bela movado, al nia sankta afero; pro tio ni petas, ke ĉiu helpu baldaŭ kaj tuj, ke ĉiu traduku nian artikolon. P. JANSSEN.

IN MEMORIAM.

ARTHUR LLOYD. † [1])

Antaŭ pli ol du jaroj mi venis al Parizo por certigi al vi, miaj karaj samideanoj, ke nova alroma movado komencis inter la Anglikanoj. Hodiaŭ mi maltimas skribi al vi, kiel samreligiano, kiel katoliko, por rakonti mallongan

---

[1]) Nov. 23, 1912.

Estimata Redaktoro,

Mi esperas, ke letero kaj verketo de la Anglikano, kiu partoprenis Nian Unuan Kongreson en Parizo ne estos malagrabla al vi.

Dank' al Dio, mi ne plu estas Anglikano sed Katoliko, kaj mi deziras faciligi la revenon de la Anglikanoj kaj aliaj Protestantoj al la vera Eklezio.

Mi do prezentas al vi, la redaktoro de E. K., la enmetitan verketon, kiel memoraĵon al unu el la pioniroj de la 20a-centjara reviviĝo ne nur en Anglujo, sed tra la tuta Angla raso. La rakonto de lia vivo ŝajnas al mi enhavi kaj kuraĝigon kaj admonojn utilajn al katolikoj kaj konvertotoj.

Kun la plej granda respekto,

Mi restas, kara Sinjoro,

Via fidele,

A. H. NANKIVELL.

Croftside,

Dorking,

Anglujo.

historieton pri unu el la pioniroj de tiu movado, kaj petegi viajn fervorajn preĝojn por lia animo.

ARTHUR LLOYD naskiĝis en Simla en la jaro 1852. Li estis filo de brava militoficiro, Majoro Frederiko Lloyd, de la „Bengal Native Infantry." Li estis edukita en la fama Kolegio Peterhouse (Petradomo) en la Universitato de Kembriĝo, kaj poste fariĝis Kunfrato kaj Dekano de sia Kolegio. Li fariĝis Anglikana pastro, kaj iris al Japanujo kiel misiisto en 1885.

Li estis klerulo de altaj principoj kaj larĝaj simpatioj; kaj la dividoj kaj malpacoj inter Kristanoj ŝajnis al li tute netolereblaj. La solvado de la problemo de Kristana unueco senĉese okupis lian spiriton. Post longa meditado li lernis vidi en la Petra Seĝo la solan esperon de reunuigita Kristanaro.

Al la klera mondo li estis konata kiel distingiĝa profesoro de la klasikaj lingvoj, kiel kompetentulo sen konkuranto pri la religio de la Japanaj Budhanoj.

Al ni li estas la unua Anglikano, kiu pagis la Petran monon laŭ la kutimo de siaj katolikaj prapatroj.

En la jaro 1903 oni fondis en Usono Anglikanan Gazeton, nomatan *The Lamp*, (*La Lampo,*) por labori por la reveno de la Anglikana Eklezio al la unu Ŝafejo. (Tiu gazeto nun estas katolika.) En la dua numero de la gazeto, Lloyd kontribuis trafan artikolon sub la titolo, „Kiel ŝajnas al Misiisto!" En tiu rimarkinda artikolo, malfeliĉe tro longa por transskribi, li unue klarigis ke la Eklezio vera devas havi Episkoparon devenantan de la Apostoloj por esti la aŭtoritata transdonanto de sacerdota aŭtoritato kaj graco, la konfidinda gardisto de la Fido.

Poste li rimarkis ke en Japanujo ekzistas tri religiaj korpoj, kiuj posedas aŭ pretendas posedi tiun ĉi Episkoparon, — nome, la Rom-katolikoj, la Rus-ortodoksoj, kaj la Anglikanoj. „Ekzistas dividoj en la episkopa Kolegio! Fakte, episkopa regado sole, sen kapo, ne kondukas al unueco. Devas esti Centro de unueco, ĉef-generalo."

Kaj la neeviteblan konkludon de lia argumento li sentime esprimis en la jenaj vortoj:

„Mi do lernis turni min al la Seĝo de Petro, la neŝanĝanta atestanto, al la Unueco de la Eklezio de Kristo,... kaj preĝi ke Li, Kiu sole povas turni la korojn de la infanoj al la patroj, volu turni la korojn de ni Anglikanoj al la Regado, de kiu en malbona horo ni forigis nin.... Mi do pagas de tempo al tempo la Petran monon, kiel eksteran kaj videblan signon de la deziro de mia koro."

Ni devas noti ke la argumento multe valoras, spite la fakton bonekonatan, ke la Anglikanoj ne havas verajn Episkopojn. Ĉar unue la ortodoksoj kaj aliaj skismantoj posedas episkopojn, tiel ke oni povas vere diri, ke la episkoparo estas dividita; kaj due, kvankam la Anglikanoj ne havas verajn episkopojn, ili pretendas sincere havi tiajn, kaj rilate al ili la argumento estas bona „argumentum ad hominem".

Revenante al nia historio, mi devas diri ke la Anglikana Misia Societo tuj forigis Lloyd de lia ofico. (Li estis en tiu tempo Prezidanto de la Misia Komitato en Japanujo, kaj ankaŭ Prezidanto de la Kolegio de S. Paŭlo en Tokio.) Li ĉesis de tiu tago fari la pastran laboron. Liaj mensaj suferoj estis tiel severaj, ke lin atakis grava cerb-malsano kaj li preskaŭ mortis.

Pli poste, je la fino de la Rus-Japana milito, Lloyd, sendante la kutiman monon, kuraĝis skribi al la Sankta Patro por sciigi Lin pri la bonfarado kaj bonkoreco de la Mikado kontraŭ liaj katolikaj soldatoj en la daŭro de la milito. Lia Papa Moŝto sendis leteron dankespriman al la Mikado per Episkopo (poste Kardinalo) O'Connell. Tiel kontentigita estis la Mikado pri tiu signo de honoro, ke li afable donis permeson al la Jezuitoj fondi Katolikan Universitaton en Tokio. Tiamaniere de malgranda pia ago de nekatoliko komencis laboro, kiu per la helpo de Dio estos beno al nekalkuleblaj generacioj.

La lastaj vortoj pri tiu ĉi nobla viro estas tiel tristaj, ke mi apenaŭ povas skribi ilin. ARTHUR LLOYD, kiu helpis tiel multajn homojn submetiĝi al la Sankta Seĝo, mortis mem ekstere de la unu vera ŝafejo en Oktobro 27, 1911. Al mi ŝajnas nekredebla malfeliĉego, neforgesebla admono al la prokrastantoj. Klarigi tion, kompreni tion ni ne povas.

La plej mizerikorda Dio kompatu al li kaj memoru liajn multajn bonfarojn! A. H. NANKIVELL.

Katolika Vivo Ĉiulanda.

Salutparolado, kiun elparolis la gvidisto de pola komitato, princo Paŭlo Sapieĥa, en kunveno de pola sekcio en preĝejo de Sankta Mikaelo dum eŭkaristia Kongreso en Vieno.

La celo de l' kongreso estas kaj devas esti glora kaj publika konfeso de kredo je la vereco, ke estas en Hostio: „Dio viva, kaŝita sed vera". Tiu konfeso grandamase prezentita devas ekregi kaj ekbruligi la korojn, eĉ pli indiferentajn, kvankam pli varmajn — ĉar la kredo kaj amo de tiuj sennombraj anaroj devas komunikiĝi al ĉiuj! Sub influo de ĉi tiu laŭta „Credo" eldirita de centmiloj da buŝoj de riprezentantoj el preskaŭ ĉiuj rasoj, gentoj kaj nacioj — ĝi eble ekbruletos per Difajro ankaŭ la koron de ĉi tiu, kiu, eble tirita de scivolemo, alvenis ĉi tien.

Ĉar homo, kiu meritis, esti nomata bona katoliko, sed kiu ankoraŭ ne suprenleviĝis al heroeco — ekflamos certe ĉe tiu amflamo al kaŝita Dio — kaj estos kapabla per amo fariĝi eĉ martirulo.

Jen la celo, kiun la Kongreso devas akiri inter samlandanoj kaj samkredanoj. — Tamen estas ankoraŭ alia celo, jen apostola, jen misiista.

La unuaj kristanoj konvertis per martireco — ni kontraŭe povas kaj devas konverti per kredo, ĝin konfesi per vivo, amo kaj humileco en parolo kaj ago. Certe estas, ke la kongreso sola, per si mem, ne konvertos senkredulojn kaj nekredantojn kiel la eksterajn atestantojn de ĉi tiu festo — sed nepre devigos ilin pensi: kio estas ĉi tiu kredo! tiel antikva, tiel viviga, tiel neŝanĝebla! Pri amo de unuaj kristanoj al plej Sankta Sakramento parolis ja idolanoj kun malico, kalumnio kaj blasfemo — kaj tamen ili permesis esti enfine de ĝi ĉirkaŭprenitaj.

Ankaŭ la hodiaŭaj idolanoj, kiam ili ekvidos milojn da katolikoj, kiuj kune kun maljuna monarĥo kaj malhumiloj

ekgenuas antaŭ Eŭkaristio — unuj koleriĝos, aliaj mokados, sed ĉiuj miregos — kaj mi kredas, ke ne ĉesos soni sen eĥo en iliaj koroj kaj animoj ĉi tiuj solenaj momentoj — kiel ili ne ĉesis soni sen eĥo en katolika Köln en protestanta Londono kaj en Madrido ĉirkaŭprenita de framasonoj.

Sed kie prezentas la katolika mondo tiel potencan, tiel ĝeneralan kredkonfeson al plej Sankta Sakramento — ni Poloj devas nepre ĉeesti. Jen ni „Polonia semper fidelis" ĉiam ariĝis ĉirkaŭ „Sanctissimum", dum kritikaj kaj gravaj momentoj. Jam oni estis batalinta apud Grunwald, kiam la reĝo Ladislaŭo Jagiello ĉeestis ankoraŭ trian Diservon. Eĉ dum kuglohajlo de Svedoj ĉirkaŭportis procesie la pastro Kordecki „Sanctissimum" sur remparoj de Jasna Góra (hela monto en Ĉenstoĥova) kvazaŭ devigis per fido kaj kredo je Savinto, por savi la Respublikon. Ankaŭ antaŭ du kaj duono da jarcentoj tie-ĉi, ĉe muroj de tiu-ĉi urbo ĉeestis la reĝo (Sobieski) diservon, kuŝante krucforme antaŭ komenco de batalo kaj komuniiĝis — enfine kian lokon ni ekokupis en historio de katolika mondo, atestas la hieraŭaj paroladoj (12-an de Septembro), atestas la fakto, ke kardinalo — papa sendito — malfermante la kongreson eŭkaristian tutmondan, trifoje estas citinta Pollandon; tion saman faris ankaŭ la urbestro de Vieno, la Kulturministro kaj la riprezentanto de ĉiuj alilanduloj ĉeestantaj en kongreso — la belgika delegito Brifaŭt.

Sed ne nur en publika vivo de Polujo ĉi tiu plej Sankta Sakramento altiradis jen la suferantojn doloron, jen feliĉulojn, jen petantojn kompaton, jen tiujn, kiuj dankis pro ĝi — en Pollando oni utiligis ĉiun okazon, por honorigi Dion komune kaj publike; kion pruvas malnovtempaj kaj nombraj sinod-dekretoj, la ordonoj de episkopoj, kortuŝantaj moroj sanktigitaj de centjara praktikado.

Antikva kaj bona tradicio devigas nin partopreni je ĉi tiu festo — sed ĉi tiu devo estas hodiaŭ pli granda por ni (Poloj), ĉar ni povas komune prezentiĝi al tutmondo, interkoniĝi, konigi kaj memorigi, ke ni ekzistas ĉiam fidelaj kaj pretaj oferiĝi, kunligi niajn tiel deziratajn rilatojn

kaj enfine kuniĝi ĉe unu standardo, sub unu gvidisto — sed kiu estas ĉi tiu gvidisto de tutmondo? — Dio!

Ha! tiu-ĉi gvidisto ne trompos! Li kondukos certe kaj sendanĝere al venko, sed venko plej grava, ĉar venko de Si mem. Ni Lin konfesu — kaj Li nin konfesos antaŭ la Patro. Vin do nun salutante honorindaj sinjoroj kaj siniorinoj, mi volas kaj povas saluti per malnova, kristana kaj tiel de ni uzata saluto: „Laŭdata estu Jezu Kristo". Tiel! Li estu laŭdata pro estinteco, ke Li helpis al ni persisti sub Lia standardo — Li estu precipe de ni laŭdata en estonteco age kaj vorte — ĉi tiu saluto estu la vivprogramo de individuo kaj de tuta nacio en vivo privata kaj publika — tiam do ni povas fidi je vortoj de nia malnova kanto: „Aŭskultu je dia vort'":

Kiu min surtere amadas kaj agas sincere
Do mi lin ankaŭ ja ne malmemoros
En la danĝero, sed ĉiam favoros".

(De pola poeto Johano Kochanowski, naŭstrofa kanto el la XVI-a jarcento).

(Vidu „Pola Esperantisto" de Aŭgusto 1912.)

Kiajn fruktojn produktas la tutkatolikaj registaroj.

Ni vidu Belgujon, kies registaro estas trae (tute) katolika. Ĉu ĉi tiu registaro iras malantaŭen? Eĉ plej fanatika malamiko de la katolika registaro belga devas alkonsenti ke precize ĉi tiu ŝtato konstante disvolviĝas kaj potenciĝas. La sekvantaj citatoj aprobas ĉi tion plej bone:

1) Belgujo posedas rilative plej grandan fervojreton.
2) Nenie oni vojaĝas tiel malkare kaj komforte, kiel en Belgujo.
3) Depost jaro 1909 fariĝis Antverpeno plej grava haveno komerca de Tuteŭropo.
4) Nenie oni trovas tiel malkaran vivadon kiel en Belgujo.
5) Neniu ŝtato zorgas tiel pri industrio kiel Belgujo.
6) La socia leĝdonado kaj asekuro de laboristoj atingis dum lastaj 25 jaroj en neniu ŝtato tian disvolviĝon kiel en Belgujo. Ĝis la jaro 1884, en kiu komenciĝis

la erao *) de katolika registaro, la leĝaro egaliĝis preskaŭ nulo.

7) Daŭre de 26 jaroj (1884—1910) oni enkondukis en Belgujo nenian novan imposton malgraŭ grandegaj elspezoj je diversaj celoj, esceptinte la plialtigon de alkoholaĵ-imposto.

8) De jaro 1880—1907 la nombro de analfabetoj malaltiĝis je pli ol duono.

Ĉe tiuj-ĉi faktoj estas devigita eĉ la protestant-gazeto „Temps" konfesi, ke „registaroj dekstraj t. e. katolikaj pretigis al Belgujo grandiozan periodon de bonstato kaj feliĉo"; la framasona „Tribuno" diras: „Belgujo povas servi kiel modelo kaj ekzemplo al aliaj Eŭropŝtatoj".

Jen tiajn fruktojn produktas la trae katolikaj registaroj!

El Pola gazeto *Preglad* (= Revuo.)
tradukis L. PAJOR.

La Oktavo de Preĝado.

Croftside, Dorking, Anglujo.
7 decembro 1912.

Tre Estimata Redaktoro,

Kun via bonvolo mi petas permeson fari kiel Katoliko tion, kion mi ofte faris kiel Anglikano. Kaj tio estas inviti viajn legantojn partopreni je la Oktavo de Preĝado por la plenumo de la peto de nia Dia Sinjoro „ke ĉiuj estu unu". Tiun Oktavon aranĝis la Redaktoro de la Usona Gazeto „THE LAMP" antaŭ sia konvertiĝo. Poste ĝi estis daŭrigita sub la aprobo de la Ekleziaj Aŭtoritatoj kaj eĉ de Lia Papa Moŝto mem. La bona Dio benis ĝin per la plej abundaj rezultoj. La Oktavo komenciĝos kun la festo de la Katedro de S. Petro, kaj finiĝos kun la festo de la Konvertiĝo de S. Paŭlo.

Kun alta respekto, Via sidoneme,
A. H. NANKIVELL.

---

*) „Erao", (laŭ la aldono al Plena Vortaro de Emile Boirac) [vidu Vortaron pola-esperantan de Grabowski] = origino de tempo kalkulo.

BALKANAJ LANDOJ.

Serbujo. En la Mezio (teritorio de la nuna Serbujo) kristana religio disvastigata estis tre frue kaj la Belgrada episkopo Urzacio amplektis la Arianismon. Ĉirkaŭ 630-a jaro almilitis la landon Serboj, kiuj baptitaj estis en la IX-a centjaro kaj ricevis katolikajn latinajn episkopojn, sed dum la skismo forfalis ili de Romo. En komenco de la XIV-a jarcento trovas ni denove en Serbujo katolikajn latinajn episkopojn, kaj la franciskanoj havis grandan nombron da monaĥejoj.

Sed nun estas Serbujo kontraŭ la katolikoj la plej netolerema ŝtato en Eŭropo, ja eble en la tuta mondo. Ne estas tiom malservema la popolo, kiom la registaro kaj la tre malklera pastraro.

De la ĉirkaŭ 3 milionoj da loĝantoj estas 15.000 katolikoj kaj tiuj estas koloniistoj el Aŭstrio (Kroatoj, Bohemoj kaj Germanoj) kaj el Italujo; ceteraj estas grek-orientanoj escepte 50.000 mahometanoj. Publikan rajton havas la preĝejeto en Niŝ kun la katolika lernejo; 6.000 katolikoj en Belgrado devas iri en la kapelon de l' aŭstria ambasadoro. Po unu pastro estas en Belgrado kaj Niŝ, Apostola administranto de Serbujo estas D-ro Ivan KRAPAC, episkopo en Ĝakovo (en Slavonio), ĉar P. Ivo VUJIĈIĈ, kiu nomita estis apostola administranto de Serbujo, devis la landon forlasi en dudekkvar horoj.

Montenegro. En malgranda montaĵa Montenegro (Crnagora = Nigra monto) estas la katolikoj tute liberaj; ili havas ĉefepiskopon en Bar (ital. Antivari), kiu ĉiujare ricevas de la registaro 5.000 frankojn laŭ la konkordato kontraktita kun la Sankta Seĝo en 1886; nune estas ĉefepiskopo D-ro Juraj (Georgio) DOBRIĈIĈ. — 7.240 katolikoj (ĉiuj de latina rito) apartenas al dekdu paroĥoj administrataj de dektri pastroj; ĉirkaŭ 280.000 el la loĝantaro estas grek-orientanoj kaj 20.000 mahometanoj. En la ŝtataj lernejoj havas la lokaj paroĥestroj religian instruadon; ĉiujare sendas la ŝtato po unu junulo Romon, por ke li teologion studu.

Bulgarujo. Sur la teritorio de la nuna Bulgarujo jam de longe disvastiĝis kristaneco; la Slavoj ĝin ne detruis, kiuj tie regnis ĝis la 679-a jaro, kiam la Bulgaroj alvenis; sed jam en la dua parto de la naŭa jarcento baptiĝis kaj la Bulgaroj. Dum la skismo aliĝis la Bulgaroj al Konstantinoplo, sed tamen ĉiam estis en Bulgarujo ŝatata nombro da katolikoj, kiuj de la turka registaro premitaj kaj persekutitaj estis, dum Bulgarujo memstara ne sekvis tiun ekzemplon kaj al la katolikoj plenan liberecon donacis. — Ĉar la greka patriarko ekstermi volis rajtojn de la bulgara nacìo, trovis la movado al unio en 1860 j. multe da anoj kaj jam granda nombro transiris en la katolikan Eklezion, sed subite enmiksiĝis Ruslando, kiu timis katolikan ŝtaton en Balkano kaj la rusa rublo multajn unuiĝintajn tiris reen en la skismon kaj ceteraj ĉesis transiri en la kat. eklezion, ĉar Ruslando efikis ĉe la Porto religian memstarecon por la Bulgarujo; la greka patriarko metis sur la Bulgaroj anatemon, sed ili ne zorgis multe je ĝi. —

Kvankam la nombro de katolikoj en Bulgarujo estas malgranda, ili tamen ĝuas grandan liberecon, ĉar la registaro ne metis kontraŭaĵojn al la katolikoj; malhelpo estas al la katolikoj — kiel ĉie, tiel ankaŭ tie — la socialismo kun la moderna ateismo, kiu disvastiĝas en la lernejoj; ĉar la religia instruado, kaŭze de la preskaŭ nenia klereco de la skisma pastraro, troviĝis en laikaj manoj.

Katolikoj de la latina rito estas ĉirkaŭ 28.000, kiuj apartenas al du eparĥioj: nikopola (episk. Henr. DOULCET en Ruŝĉuk) kaj plovdiva (ep. Robert MENINI en Plovdiv = Filipopolo); da katolikoj de la greka rito estas tre malgranda nombro (ĉ 1.000), kiuj apartenas al la episkopo en Jedrene (Adrianopolo); 550.000 estas mahometanoj kaj ceteraj $2^1/_2$ milionoj grekorientanoj. Pastraro konsistas el 15 Sekularoj kaj 60 monaĥaj (ordenaj) pastroj; en la nikopola eparĥio estas en plimulto la pasionistoj kaj en la plovdiva la kapucenoj. Tre ŝatatan nombron da lernejoj posedas la katolikoj direktatajn de la lernejaj fratoj kaj de diversaj monaĥinoj, kiuj ankaŭ kelkajn hospitalojn prizorgas.